

Grajnoj en Vento

Claude Gacond, 129-a radioprelego, 1966.03.23 & 1966.03.26

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas Claude Gacond kaj Andrée Gacond.

Estus interese desegni foje mapon de Esperantujo. Anstataŭ prezenti la urbojn laŭ ilia loĝantara graveco, oni prezentus ilin laŭ la graveco de ilia esperantista funkcio.

A.- Stranga geografio ! Sed eble geografio, kiu multon instruus al ni pri la vivo de nia movado.

Cl.- Oni verŝajne konstatus, ke ne estas ĉiam la nombro, kiu valoras, sed la kvalito. En Svislando oni rimarkus, ke unu el la ĉefaj lokoj estas Bielo.

A.- Pro la laboro de Marcel Erbetta, verŝajne !

Cl.- Jes, ĝuste ! Tiu instruisto tenas en siaj manoj la ligilojn, kiuj grupigas 50 klasojn da gelernantoj, kiuj regule interŝanĝas tekstojn, desegnaĵojn, sonbendojn, objektojn, kaj kiuj eĉ sin vizitas reciproke.

A.- Mi ne scias, ĉu en Esperantujo ekzistas alia instruisto, kiu havas similan edukan funkcion.

Cl.- Fondinte la rondojn de **Grajnoj en Vento** Marcel Erbetta iniciatis ion tute novan. Kaj nun, kiam oni parolas pri la instruado de esperanto, ĉiam oni citas la agadon de Grajnoj en Vento. Ĉu vi scias, kiam Marcel Erbetta semis la unuajn grajnoj en la venton ?

A.- Post la Unesko-Rezolucio, se mi ne eraras !

Cl.- Jes, ĝuste. En 1956.

A.- Do Grajnoj en Vento estas 10-jara. Bela aĝo jam.

Cl.- Jes, ĉefe kiam oni pensas al la laboro, kiu devis esti fidele kaj regule plenumata. En la daŭro de tiuj 10 jaroj aperis 145 diversaj kajeroj, ĉiam je po 25 ekzempleroj, enhavantaj kontribuadojn de klasoj el ĉiuj kontinentoj. Okaze de tiu deka datreveno de Grajnoj en Vento, la interlernejaj rondoj internaciaj, Marcel Erbetta multobligis kajeron kun verkoj de gelernantoj el 21 landoj. Jen rigardu !

A.- Ho bele ! Aŭstrio. Kunvenis 4 klasoj de Grajnoj en Vento. Tiel ili rakontas: « *En junio 1965 ni veturis al Maribor (Jugoslavio) por partopreni kunvenon de klasoj de Grajnoj en Vento. En la stacidomo de Maribor atendis nin niaj mariboraj geamikoj kun gepatroj. Ni estis por tri tagoj gastoj de niaj amikoj.* »

Cl.- Ili rakontas, kiom ili plezuris dum tiu aranĝo. Sed legu tiun ĉi linon :

A.- « *Baldaŭ ni preskaŭ forgesis, ke ni estas en fremda lando. Kun dankemo ni ofte pensas, ke la vojaĝo estis granda evento de nia vivo.* »

Cl.- Bela konkludo, ĉu ne ! Povu foje ĉiuj klasoj en la mondo renkontiĝi pere de Grajnoj en Vento malgraŭ la limoj, feraj kurtenoj kaj ŝovinismoj. Okazis aliaj similaj geknabaj interŝanĝoj pere de Grajnoj en Vento. Jen legu!

A.- « *Argentino. De la 27-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 1963 5 knaboj kaj 5 knabinoj 11- kaj 12-jaraj de la Escuela Normal Rafaela restis en la Escuela de Malvin en Montevideo kiel lernantoj kaj loĝis en urugvajaj hejmoj kvazaŭ filoj.* »

Cl.- Legu tiun paragrafon!

A.- « *Ni alvenis al la lernejo kiel la antaŭaj tagoj, sed niaj koroj estis iomete malgajaj, ĉar estis la lasta tago por resti kun la urugvajaj gefratoj kaj kamaradoj. Humuraĵoj kaj ridadoj*

Graĵnoj en Vento

Claude Gacond, 129-a radioprelego, 1966.03.23 & 1966.03.26

volis sekretiĝi nian malĝojon. En la lasta horo en la lernejo estis specialaj emociaj vortoj, kaj varmaj larmoj°; la urugvajanoj kaj argentinanoj unuigis siajn voĉojn por kanti. Ni ricevis librojn, flagojn kaj memoraĵojn. »

Cl.- Tiu infana teksto finiĝas tiel°: « Ankaŭ ni memoros pri ĉiuj lernantoj kiuj, kiam ni foriris, levis siajn manojn kaj diris°: « Ĝis baldaŭ, argentinaj gefratoj! » Niaj gorgoj sufokitaj pro la plorado nur povis murmuri°: - Ni atendas vin en nia lando, urugvajaj gefratoj! »

A.- Ni rigardu sub la titolo Urugvajo, eble ili rakontos pri tiu dua vizito.

Cl.- Jes, ĝuste. Legante tiun rakonton vi denove konstatos, kiom necesaj estas similaj interŝanĝoj. Ili konklude diras, ke ili revenis hejmen kontentaj...

A.- « *kaj dezirantaj denove renkonti ilin, sed iom malĝojaj ankaŭ, forlasi tiujn geknabojn kaj « gepatrojn », kiuj tiel ĉarme akceptis nin. Por ni, ĝi estos tre bela memoraĵo, kiun ni neniam povos forgesi. »*

Cl.- Sed tiu kajero ne nur prezentas geknabajn interŝanĝojn. Ĝenerale ni trovas infanajn rakontojn kaj desegnaĵojn. Kelkaj tekstoj estas poezi-plenaj. Aŭskultu, kion diras bulgarino : « *Venis la printempo !... La ŝafidoj gaje saltas sur la verda freŝa herbo en la paŝtejoj. Paŝtisto ludas ŝalmon mielan. Lia ŝafaro dolĉe paŝtiĝas sub la sonoj ŝalmaj. »*

A.- Ĉefino esperantigis slovakajn proverbojn. Aŭdu : « *Superflua la beleco, kie mankas la saĝeco !*

Cl.- *Ne daŭras beleco, sed nur honesteco.*

A.- *Kiu volas trovi belon, bonon, tiu devas iri longan vojon. »*

Cl.- Germana knabino skribis ŝercojn, aŭskultu : « *Jim, konfesu, ke vi nomis la akuzanton « ŝafkapo » - « Mi ne memoras, sed ju pli longe mi rigardas lin, des pli verŝajne mi supozas tion. »*

A.- Sinjorino Bunsj diras al sia edzo : « *Prenu ekzemplon je la homoj vid-al-vide. Kiam sinjoro Muller revenas el la laborejo, li kisas sinjorinon Muller. – Kial ? Mi ja ne konas sinjorinon Muller. »*

Cl.- Fritz demandas : « *Panjo, kiam mi ricevos malgrandan fratinon ?* » La patrino demandas : « *Do kial ?* » - « *Estas enue pinĉi ĉiam nur la hundon !* »

A.- Japanoj priskribas la aŭtunon, italoj rakontas pri sia ŝat-okupo, jugoslavo rakontas pri inundo, nov-zelandanoj rakontas maorian legendon.

Cl.- Vidante similan kajeron oni komprenas la ĝojon de la gelernantoj por tiuj interŝanĝoj. Dum la esperanto-kursoj, anstataŭ traduki aŭ legi lernolibrajn rakontojn, ili verkas mem siajn tekstojn kaj konatiĝas kun infanoj el foraj landoj. Kaj post kelkaj monatoj oni aŭdas infanojn diri : « *Sed la japanoj estas kiel ni !* » Tio okazis en mia klaso.

A.- Tiam en ilia koro ĝermis semo de homaranismo.

Cl.- Do vivu longe kaj progresu Graĵnoj en Vento. Senĉese plimultiĝu la kunlaborantaj klasoj.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude Gacond kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-